
# LA SKOLTA MONDO

OFICIALA ORGANO DE LA SKOLTA ESPERANTISTA LIGO



VOLUMO 4 N·RO 9 ·A JARKVARONO 1971

# S ☆ E ☆ L


Fondinto: "Avoto"
Kunfondinto: J.W. Leslie

Honoraj Prezidantoj:
"Avoto". Norman Booth.
Kolonelo D. H. Davis.
L. J. Van Gulck.

Prezidanto: John Berggreen,
Brattvollveien 23 c,
Nordstrandhøgda, Norvegujo.

Sekretario: J. K. Hammer,
Taxusstraat 7, Zaandam,
Nederlando.

Kasisto: David H. Withey,
21 Brookfield Avenue,
Waterloo, Liverpool 22,
Britujo.

Redaktoro: Hans Amund Rosbach,
Nergata 37 c, N-6500
Kristiansund N, Norvegujo.

La Skolta Mondo aperas kvarfoje en la jaro.


# TOKIO ?

# LONDONO ?

Al la unuopaj membroj de nia Ligo la dilemo ĉu Londono, ĉu Tokio, ne estas granda.Espereble multaj el niaj membroj trovos okazon ligi novajn internaciajn kontaktojn dum la ĵamboreo, tiom, ke la skoltaj aŭtoritatuloj povos vidi la utilon de la **internacia** lingvo dum **ĉiaj** ĵamboreoj kaj aliaj kontaktoj sur internacia nivelo.
Espereble multaj aliaj povos iri al Londono por i.a. partopreni en la kunveno kaj ekskursoj de SEL., kaj per sia partopreno en diskuto ktp. doni helpon al la progreso de la ligo en la estonteco.

Dilemo tamen ne estas – verŝajne neniu havas eblecon partopreni la du, kaj al la aliaj la monujo ja decidis.

Sed al la redaktoro estas dilemo. Ĉu Londono? Ĉu Tokio?
La kompromiso estas ambaŭ. Tial vi do trovas nun numeron, en kiu ni provis doni lokon al du landoj kaj du metropoloj.



# SALUTO DE

Karaj SEL-anoj!

Okaze de la nova jaro mi elkore salutas vin.

Unue mi dankas al vi pro fidela laboro por nia organizaĵo dum 1970. Unuavice mi rektas la dankon al tiuj Naciaj Reprezentantoj, kiuj energie kaj konscience plenumis siajn taskojn. Bedaŭrinde ne ĉiuj NR kontaktis nian oficejon (t.e. la Centran Komitaton pere de la ĝen.sekr. JKH) sufiĉe ofte, sed laboris parte en silento. Por doni ne nur laŭdon, sed ankaŭ ioman riproĉon, mi volas substreki, ke estas grave, ke ĉiuj NR regule raportas al CK, por ke ni kune povu helpi unu al la alia. –

Mi volas ankaŭ danki al la membroj de la Centra Komitato: Al nia laborema kaj bonega ĝen. sekr. J. K. Hammer (kiu faras multe pli al SEL ol iu alia persono en nia Ligo), al la redaktoro de LSM H. A. Rosbach (kiu prezentas numerojn de nia organo ĉiam pli kaj pli allogajn) kaj al nia kasisto D. H. Withey (kiu havas la sendankeman rolon enkasigi monon por ni). Ili ĉiuj meritas nian komunan dankon!

Kaj nun iom pri niaj taskon en 1971:

En mia unua saluto al vi en LSM 7/70 mi montris al kelkaj gravaj flankoj de nia laboro, kiuj ankoraŭ validas. Nia ĝen. sekr. JKH en la informaj bultenoj ĈIAM PRETA regule priparolas labortaskojn por niaj NR kaj membroj. Vere

# NIA PREZIDANTO 1971

estas sufiĉe granda laboro farota por ni ĉiuj!

Ĉifoje mi volas substreki 2 el tiuj taskoj:

1. Kunlaboro kun Esperanto-kluboj:

Ĉar ni estas malmultaj ni bezonas helpon de aliaj pli fortaj organizaĵoj.

La kunlaboro kun la internaciaj ĉefoficejoj de la landaj E.-organizaĵoj kaj de la skoltoj, estas prizorgata de la CK de SEL, (kaj tio feliĉe bone progresas), sed la kontakton kun la lokaj Esp.kluboj kaj unuopaj esperantistoj devas prizorgi la anoj mem (kun helpo de la NR).

Precipe nun, dum la preparo de kursoj, studrondoj kaj memstudado de Esp. por skoltoj partoprenontaj la ĵamboreon 1971, tio estas grava afero.

Memoru propagandigi kaj uzi la diskon por "Ĵamborea Lingvo" krom la libron.

2. Fortigado de S.E.L.

Feliĉe nuntempe multaj skoltoj eklernas Esperanton, kaj ĝuste nun ni havas la eblecon membrigi ilin al nia propra organizaĵo.

Ni bezonas pli da membroj - ankaŭ por plibonigi nian ekonomion - kaj tial mi petas la unuopajn anojn fari sian plej eblan por havigi novajn adeptojn al la Ligo. Mi scias el raportoj, ke oni povas kreskigi la membraron (ekz. la norvega NR raportas pri 3-oblo dum 1970). Prenu kontakton kun la lokaj skoltaj taŭpoj kaj patroloj, kaj prezentu al ili nian oferton pri Esperanto por skoltoj. Tiel ni laboru sur 2 kampoj: Inter la esperantistoj, kaj inter la skoltoj por komuna celo: Krei pli da skoltesperantistoj!



# 13a monda jamboreo japanujo

## 第13回 世界ジャンボリーの歌

Ni redonas laŭ World Scouting.

La Ĵamboreo, kies ĝenerala temo estas "Por kompreno", komenciĝos per kampajro lundon vespere, duan de aŭgusto, kaj finiĝos per ceremonia soleno mardon vespere, dekan de aŭgusto 1971.

La ejo estas bone elektita sur Asagiri-altaĵoj ĉe la piedo de la Fuji-Monto. Estas oblikveta tereno kun fortika herbaĵo, meritiga al kromnomo "La verda Ĵamboreo".

(Kaj la partopreno de esperantistoj el multaj landoj des pli meritigos al tiu nomo! Red.)

La organizantoj antaŭvidas partoprenon de 20.000 skoltoj. Ne estas limo al la naciaj kontingentoj. El la gastiga asocio tamen ne venos pli ol 8.000 knaboj. Ni emas atentigi, ke tiu asocio ĵus ŝanĝis sian nomon al "Knabskolta Nippona asocio". Nippono estas la tradicia nomo de la lando.

Aktivecoj.


Aventura vojo: Por la kreskiĝo de la fizika forto oni elektos vojon aventuran sur la monteta flanko de la kampejo. Estas montaraj areoj apude por hajkoj, ne forgesebla la grimpo sur Fuji mem.

Boatoj kaj kanotoj: ĉ. 5 km. sude estas Tanuki-lago por akvosportoj ĝenerale, escepte de naĝado, por kio la lago estas tro malvarma. Naĝado okazos en baseno proksime al la ĵamboreejo.

Fiŝkaptado: Inter Tanuki-lago kaj la ĵamboreejo estas eblecoj por la entuziastoj de fiŝkaptado.

Aliaj eblecoj estas por motorciklado, aerpafado, rajdado kaj uzo de pafarko. La ejo jam servis dum la 5-a Nippona Ĵamboreo.

Emblemo de la ĵamboreo




Japanujo estas lando de kontrastoj inter la nova kaj la malnova. Oni retrovas en la emblemo la nun vaste konata mondemblemo de skoltismo kaj la sanktan spegulon de Nippono.

La sankta Spegulo de la Imperiestra Domo havas religian devenon en la Ŝintoismo. Ĝi estas simbolo de paco kaj harmonio. Laŭ la japana mitologio Izanagi, vira krea dio, donis poluritan arĝentan diskon al sia infanoj, ordonante al ili genui antaŭ tiu ĉiun matenon por studi la spegulbildon dum ili pripensis ĉielajn aferojn kaj penis subtreti ĉiun pasiajn kaj malbonajn pensojn, ĝis la spegulo povis montri bildon de pura kaj amplena spirito.



# El raportoj al S.E.L.



Britujo.
Britujo neniam sendas jarraporton, sed pro la regula ricevo de la sekcia bulteno "Scout Esperantist" tio apenaŭ necesas. La bultenoj montras viglan sekcian vivon. Kunveno okazas ĉiujare dum la Brita esp.kongreso.

Multaj membroj montras bonan iniciativon aranĝante kursojn aŭ informajn budojn ĉe skoltaj kunvenoj

La mortinta amiko George Rust ne nur heredigis al ni monon, ankaŭ dek grandajn librokestojn. Tiujn ni transdonis al Brita Esp.Asocio por posta divido kaj se necese por la Asocia librejo.

La NR multe aktivis por la aranĝoj dum la venonta Londona kongreso.

Nederlando.
Pro la multaj okupoj de la NR kiel sekretario de SEL, la landa sekcio nur vivetis. Tamen li verkis artikolojn por skoltaj gazetoj, kaj serĉis kontakton kun ĉiuj, kiuj partoprenis en Tokio.
En kelkaj urboj lokaj kluboj tre intensive propagandis, en unu kun sukceso: 8 novaj membroj kaj kursanoj.

Dum kelkaj tagoj ges. Schulze el Kalifornio gastis ĉe la sekr. kaj detale rakontis pri kurso kun nia lernolibro ĉe la urba kolegio, kaj pri la Universala kongreso.

La kontaktoj kun TEJO intensiviĝis kaj donis utilajn rezultojn, pro kiuj la kampanjo povis esti disvastigita al Azio kaj Turkujo.

La nederlanda sekcio nun planas SEL-tendaron aŭ kunvenon por instrui la praktikan uzon de la lingvo speciale al tiuj skoltoj kiuj iros al la ĵamboreo.
Por tio la sekcio kunlaboras kun la nederlandaj anoj de TEJO.

Italujo.
En Italujo oni aranĝas diskuton pri kulturaj kaj lingvaj diskriminacioj en laborkampo.
Partopreno senpaga, escepte de modesta asekura pago.
Dato: 17 - 31 de julio.

Finnlando.
Dum longa tempo la NR Seppo Tella vojaĝis en eksterlando, tial la sekcia vivo ne estis tiom vigla.
Tamen oni kunvenis sesfoje en la hejmo de unu el la membroj. Temoj i.a. estis la nova lernolibro, la disvastigo de LSM en loka biblioteko, decido pri komuna vojaĝo al Londono, kaj dum unu vespero oni prezentis la filmojn ktp. pri la vojaĝo de Seppo Tella.
Kun helpo de amiko E. Gadd, oni prizorgis prezentadon de filmoj pri Francujo en Imatra, ĉeestis 36 personoj inter kiuj unu italo.

Norvegujo.
La laboro de NR estis grave malhelpita de oficaj deĵoroj, kaj la limigita libertempo apenaŭ sufiĉis al la redakta laboro.
Tamen la sekcio de 6 ĝis 20 membroj. Artikoloj aperis en skoltaj kaj esperanta gazetoj. La ĉefurba esp.klubo promesis stipendion al skolto, kiu lernas la lingvon por iri al la ĵamboreo.



Westminster Abbey

Jan Dehoorne,
Rosselarestraat 64,
Diksmuide (Esen)
W-VL. Belgujo
deziras korespondi kun
skolto aŭ skoltino.

Sinjorino Schulze
gvidas kurson
por instrua fako de
loka radiostacio.
Nun ŝi bezonas adresojn
de geknaboj 10-12-jaraj
por korespondo.
Adreso:
S-ino H. G. Wills,
94 West Riverglen Drive,
Worthington,
OHIO 43085 USA

**FUJI**



Kuraĝigoj estas petataj por la skoltoj:

# VOLAS KORESPONDI

Ray Noble, 4 Burrows Way,
Rayleigh, SS6 7DG Essex.
(17 jara)

Paul Welch,
35 St James Ave. East,
Stanford-le-Hope, Essex.
(15 jara)

S.F. Wright,
49 Finchingfield Way,
Monwick,
Colchester, Essex.
(17 jara)




Tiuj tri komencis la studadon de la internacia lingvo.

Sendu salutojn al la kursanoj de
A. Bloemhard,
Hoefbladlaan 58,
Den Haag, Nederlando.
Temas pri skoltoj 13-16 jaraj kaj skoltestro 26 jara.

# NI RICEVIS:

De temp' al tempo la redaktoro ricevas el diversaj fontoj iajn presaĵojn.
Ĉefe temas pri revuoj interŝanĝe sendataj, kio helpas al supervido de la esperantomovado.
Ankaŭ libroj alvenas – por mencio en la gazeto.
Lastatempe venis tri libroj el Brazilio. El tiuj nur unu estis en la internacia lingvo:
La Turmentego de la memmortigintoj. Temas pri spiritista libro.
La aliaj du estis en nacia lingvo kaj nelegeblaj al la redaktoro.

El Belgujo ni ricevis eltondaĵon el flandralingva gazeto pri norvega episkopo luterana, kiu predikis en katolika preĝejo.
Ni sukcesis legi ĝin, kun des pli da intereso, ĉar **temas** pri studamiko. Jen "Por kompreniĝo"!



La katedralo de Wells estas el la pli malgrandaj en Anglujo, sed tamen inter la plej belaj de la mondo.

Tiu ĉi katedralo estas konstruita en la 13-a jarcento. Ĝia tuta longeco estas 113 metroj. La ĉefnavo mezuras 49 metrojn.



# SUPREI

Oni iam faris jer
demandon al pas
montogrimpanto:
Kial vi volas ris
vian vivon por grim
supren al la pinto

Kaj li respondis:
Ĉar la pintoj est
tie.

Kiel homoj ni cer
konas tiun dezir
atingi al pinto
kaj kiel skoltoj
des pli kompren
ĝin.

La skoltismo esta
kvankam ludo, v
por atingi la supr
kaj helpi aliajn
la sama alta cel

Tial la skolta le
diras:

Skolto devas es
utila kaj helpi alia

La skoltismo gvid
supren ne nur per
aktivecoj kaj prov
konkeri malfacilaĵo
en la ĉiutaga viv
sed ankaŭ montran
al la helpo kiun
fido al Dio dona


Laŭ mia honoro
promesas, ke ĝis m
povo
mi plenumas mi
devon al Dio –

tiu promeso est
same forton donant
kiel ĝi devigas.

Tiu promeso kreas
la skoltismo bel
katedralon kun
fundamento sur
tero, sed kun tu
montranta ĉiele
kaj tiel donante
la tuto belecon k
signifon.

La vojo estas u

SUPREN!



Tokio : Meiji-tuin.

La japana ŝtatreligio estas ŝintoismo.
Oni ne scias la originon de tiu religio, kiu estas panteista, kaj adoras multajn diojn. Oni oferas fruktojn, rizon, florojn ktp en la temploj aŭ antaŭ domaltaroj.

La budhismo venis al Japanujo en la VI-a jarcento el Hindujo, tra Ĉinujo kaj Koreujo, kaj nun havas ĉ. 70 milionojn da adeptoj.
La budhismo japana kuniĝis kun la ŝintoismo, kaj ne malofte japano uzas ambaŭ kultojn.


La japanaj temploj estas multaj, kaj havas gracian belecon, tre admiratan de alilandaj vizitantoj.

Kontrastan efikon ofte donas la dibildoj, kiuj per sia groteska ekstero donas al la okcidentano plaĉetan timigan kriblon laŭ la spino.

Certe la skoltoj havantaj la unikan eblecon viziti la ĵamboreon, revenos al sia hejmlando plenŝtopitaj da impresoj.

Ni nur esprimu la deziron ke la ĵamboreo kun devizo Por Kompreniĝo fariĝos la unua ŝtupo al kompreniĝo, pere de la internacia lingvo.

# Niaj lupidoj




Por la ĉina karnavalo oni uzos

1. kimonon. La patrino havas restpecon da ŝtofo, 1.2 m longa kaj 1 m larĝa. Eltranĉu truon por la kapo. Fiksu per sekurcpingloj (amerikaj pingloj) sub la brakoj, kaj jen: aŭtentika kimono.

2. pajlan ĉapelon. El kartono tranĉu cirklon de proksimume 60 cm diametro. El ĝi eltranĉu pecon (rigardu ③) kaj kungluu la randojn. La pajlon ni petu ĉe farmisto aŭ butikisto, kaj tranĉu pecojn tiel longajn, ke la pajlo elstaru iom de la rando de la ĉapelo. Por krei efikon vi povas alfiksi harplektitaĵon el lano. Forta rubando alfiksu la ĉapelon al la kapo.

3. pantoflojn. La konstruo ne estas malfacila, sed postulas paciencon. Kelkajn pajlerojn ni ĉirkaŭvolvas per ŝnuro aŭ pajlo (fig 5-7), volvas tiun volvaĵon kunkudrante ĝin per ŝnuro. Per



Nara.

# alivestas en orientaj kostumoj




rubandoj ni povas ligi ilin al la piedoj.
Aliaĵn pantoflojn vi povas fari el lignobretetoj.
Kaj jen vi aspektas orientdevena.

La ĉambron vi ornamu per bambuaj arbetoj. Vi ŝiru gazeton en du duonoj kaj ruliĝu la partojn aparte sed ne tro firme. Poste trancu laŭ nia ilustracio kaj elŝovu singarde la rulon. Tiel elkreskas belega planto. Kiam vi pli lertiĝis, vi povas fari tion laŭ la bildoj 12 kaj 13. Notu bone, ke vi ne dovas fari rulaĵon tro dikan, ĉar tiam vi ne povas tratranĉi ĝin.


Al tia festo apartenas arta fajro. Ne estas vera festo sen ĝi, kaj al orienta festo harmonias elpafado de koloritaj sagoj. Sed ni ne ludas per vera fajro, tio estus danĝera. Ni bezonas: pecon da fortika ŝtofo (± 10x30cm), sablon, buntajn rubandojn el ŝtofo aŭ kreppapero, 2 ŝnurojn. Faru sakon el la ŝtofo, (atentu: bone fermitan), plenigu ĝin per sablo, fermu ĝin bonege kaj fiksu al ĝi la rubandojn. Nun fiksu fortan ŝnuron al la saketo per sekura nodo, iru for de ĉio vitra, kaj per la ŝnuro ĵetu ĝin rekte suprne. Ĝi falos bele, kaj la multkoloraj rubandoj serpentos post ĝi.

Ankaŭ ĉinaj lanternoj apartenas al la festo.
Por fari ilin ni uzas folion da fortika papero (kartono), sur ĉiun ni desegnas fajroĉpruecan drakon. Poste ni tranĉas liniajn truojn kiuj finas ĉ 1.5 cm de la rando. Kunglu kaj premu tiel ke lanterno formiĝas. Por ke la lanterno konservu la formon, vi faru el alia papero laŭ





nia bildo 15, kaj gluu ĝin en la interno de la lanterno.
Al la lanterno vi povas fiksi belan buntan fadenaron por beligaĵo.




Certe vi bezonos por la festo iun amuzan programon

Jen ideo:
Ludo de ombroj.

Tranĉu el kartono konturon de persono aŭ besto. Faru apartan brakon, kiun vi moveblan alfiksas.
Fiksu al la movebla brako kaj al la korpo ferdraton, kiun vi uzos por la ludo.

En la ĉambro vi faros ludejon per blanka litotuko kaj sub ĝi litkovrilon.
Pendigu lampon malantaŭ tio. La lampo kreas ombrojn sur la blanka litotuko, sed la litokovrilo sube ne devas translasi la lumon.

Vi devas stari tiel proksime al la litotuko kiel eble, aŭ la ombrobildoj fariĝos malbonaj.

Komprenehle la rigardantoj jasidas aliflanke de la tuko - sed tion ni ne bezonas skribi ĉi tie en la gazeto - aŭ ĉu?

Se vi faras diversajn ombropupojn, vi povas ludi popolfabelojn. La montrita figuro estas orientdevena - por via orientkostuma festo.

Sed vi ankaŭ povas ludi ekz. la norvegajn popolfabelojn el pli fruaj numeroj de LSM.

Bonan amuzon!

# La ideon kaj la bildojn ni ricevis el BELGUJO



Naciaj reprezentantoj:

Aŭstralio: S-ro S.H. Milligan, 274 Mont Albert Rd., Surrey Hills, 3127 Victoria. Telefono WF 7948.

Belgujo: S-ro Eddy Frederickx, Paasbloemstraat 31, B-2060 Merksem-Antwerpen. Poŝtĉekk. 9978.93. Tel. (03)4524.76.

Brazilio: S-ro Euclides C. Soares, Av. Almirante Tamandare 979, Belem, Para.

Britujo: S-ro C. Bardsley, 42 Westbourne Street, Oldham, Lancs.

Danlando: S-ro Asger Petersen, Blistrupsvej 8, DK 2610 Rødovre. Telefono 7 07 1 57

Finnlando: S-ro Seppo Tella, Museokatu 24 A 8, Helsinki 10. Telefono 90/447519.

Francujo: Monsinjoro Patrick Truchemotte, 76 Rue Lombard, Bordeaux

Hispanujo: S-ro Pedro Marqueta, Fern el Catolico 32, 5°izqda, Zaragoza. Telefono 25 20 44.

Italujo: Prof. Franco Tulone, Via Frangipene 8, 92019 Sciacca, Agrigento. Telefono 21.198.

Japanujo: S-ro Sinzo Sumiya, Daido Kagaku Sooti K.K. 16, Suekirotyo Kitatu, Osaka.

Kanado: S-ro John H.F. Hoyle, Box 421, Forest Ont..
Helpa N.R.: S-ro Paul Ronald, 45, 10th Ave., Roxboro, Queb.

Kongo: S-ro Paul Deloin Nzemba-Paku, B.P. 198, Limete, Kinshasa.

Nederlando: S-ro J.K. Hammer, Taxusstraat 7, Zaandam. Telefono (02980)-66931. Poŝtkonto 63 22 46.

Norvegujo: S-ro H.A. Rosbach, Nergt. 37c, N 6500 Kristiansund N. Tel (073)-77620. Poŝtkonto 8 03 04 13.

Portugalujo: S-ro J.P. de Melo, Rua Jacinto Nunes 17-3°Dt°, Lisboa I

Usono: S-ro H. William Beare, 1007 Chicago Blvd., San Antonio, Texas 8 15 39.

David Withey: telefono WAT 2936.
L.J. van Gulck: telefono 03-3688.08. Poŝtkonto Belga Skolta Esperanto-Sekretariato 327460.

LA SKOLTA MONDO. Memoru la limtempon. La datoj estas 1-a de Februaro, 1-a de Majo, 1-a de Aŭgusto kaj 1-a de Novembro.

"ESTU PRETA"

# AL TOKIO?

ひらがな

HIRAGANA

漢字

KAN-JI

カタカナ

KATAKANA

JEN TRI ALFABETOJ UZATAJ EN JAPANUJO.

TIAL



## LERNU ESPERANTON!



REDAKCIO: N-6500 KRISTIANSUND